Regularo por la ekzameno ILEI-UEA ĉe Zaozhuang-a Universitato, Ĉinio (la 12-an de Julio 2026)

La 12-an de Julio 2026, en la Nova Kampuso de Zaozhuang-a Universitato, en urbo Zaozhuang de Shandong-provinco de Ĉinio, okazos sesio de la ekzameno de ILEI-UEA. Pro la speciala situacio dum la Kongreso de ILEI, tiu ĉi regularo iom malsamas de la ĝenerala regularo, kvankam ĝi plene respektas la apartan karakteron de la ekzamenoj de ILEI-UEA (kompare interalie kun KER-UEA), kiuj tradicie enhavas ankaŭ kulturan parton.

1) La ekzameno de ILEI-UEA en Zaozhuang-a Universitato estos nur ĉeesta, skriba, je la nivelo B1.

2) La ekzameno daŭros de la 9:30 ĝis la 12:00. La loko estos provizata de Zaozhuang-a Universitato.

3) La ekzameno devas esti vokata du monatojn antaŭ la efektiva ekzamena dato (alivorte, ĝis la 12-a Majo por Julio). Povas voki la ekzamenon la vicprezidanto de ILEI, Alessandra Madella, jam surloke ĉe Zaozhuang-a Universitato kiel ties instruisto, plenigante la koncernan petilon por sesio-organizo.

4) La kandidatoj devas pagi 15 eŭrojn al la UEA-konto de ILEI (ILEK-A) aŭ 120 RMB al la WeChat adreso de la surloka peranto Alessandra Madella, kiu ĝiros al ILEK-A la korespondan sumon en eŭroj. La pago devas alveni al ILEI antaŭ la 12-a de Junio. La kasisto de ILEI sendos al la retadreso de la kandidato kvitancon de la ricevita pago. La tuta sumo iros al ILEI kaj estos uzata por kovri kostojn rilatajn al la Kongreso de ILEI en Zaozhuang.

5) Pro sia valoro de testado de nova nur-skriba testo, la ekzameno okazos eĉ se estos nur unu kandidato.

6) La ekzamen-teksto estos pretigata de la estrarano de ILEI Laura Brazzabeni, kun la helpo de Alessandra Madella. Kiel la pasintaj tekstoj de la ekzameno ILEI-UEA, ĝi enhavos lingvan kaj kulturan partojn.

7) Se eblos, Laura Brazzabeni donos surlokan lecionon antaŭ la ekzameno mem (de 8:30 al 9:30 de la sama dato, en la sama loko). Se tio ne eblos, ILEI provizos studmaterialojn en sia retejo antaŭ la ekzameno, por ke la kandidato havu almenaŭ tri semajnojn por studi.

8) La universitato provizos homojn por kontroli la seriozan disvolvon de la ekzameno. Se eblos, Laura Brazzabeni gvidos la kontrolistojn.

9) La ekzamena komisiono konsistos el la tri rajtigitaj membroj Laura Brazzabeni, Alessandra Madella kaj François Lo Jacomo. Laŭeble, la korektado de la ekzamen-pruvoj okazos la 13-an de Julio. Se pro iu ajn kialo ne eblos al la komisiono kunveni surloke por la korektado de la ekzamen-tekstoj, eblos kunveni rete.

10) La kandidatoj, kiuj sukcese trapasos la ekzamenon, ricevos ciferecan atestilon kun poentoj, kiu estos sendata de ILEI al ilia retadreso. Eblos peti dulingvan atestilon.